


# KATALUNA ESPERANTISTO

OFICIALA ORGANO DE KATALUNA ESPERANTO-ASOCIO

NUMERO 284 (51) - KVINA EPOKO

APRILIO 1993



**Printempo  
de la lingvoj  
en Tolosa**



ASSOCIACIÓ  
CATALANA  
D'ESPERANTO  KATALUNA  
ESPERANTO-  
ASOCIO

(Registrita ĉe "Generalitat de Catalunya" en la unua sekcio per n-ro 5785)  
Apartat/Positejo 290 - 08200 Sabadell - Catalunya/Katalunio. Tel. (93)716.36.33  
(ekde lundo ĝis vendredo inter la 20a kaj 22a h.). FAX (93)727.42.08. Kolektiva  
membro de Kooperativo de Literatura Folro. Kun laborinterkonsento kun la Akade-  
mio Internacia de la Sciencoj San Marino.

**KOTIZOJ POR LA JARO 1993:** Individua Abonanta Membro 3.000 p-toj; Individua  
Subtenanta Membro 6.000 p-toj; Individua Dumviva Membro 60.000 p-toj; Kolektiva  
Membro 6.000 p-toj.

**BANKO:** Caixa de Pensions - agència 461 - Sabadell - konto: 550-53.

**PLENUMKOMITATO DE KEA:** Prezidanto: Josep Franquesa; Viceprezidanto:  
Maria Nuez-Garcés; Ĝenerala Sekretario: Llibert Puig; Vicesekretario: Hektor  
Alos; Kasisto: Lluís Armadans;

**Komitatoj:** Miguel Ángel Altuna, Bartomeu Costa, Joan R. Guifón, Ĝirona Espe-  
ro, Francesc Ibáñez, Joan Marimon, Josep Ma. Milla.

**KONTROLA KOMISIONO:** Tomàs Alberich, Ricard Jordana, Óscar Puig.

**KATALUNA ESPERANTISTO:** Hektor Alos, Ferrid Macip, Llibert Puig.

Redaktoro pri la paĝoj por komencantoj kaj progresantoj: Gemma Armadans.

La artikoloj publikigitaj en *Kataluna Esperantisto* ne nepre esprimas la starpunkton  
de KEA, se ili ne estas subskribitaj ĝianome.

**KATALUNA ESPERANTO-JUNULARO:** Apartat 32.318, 08080 Barcelona.

**KONSERVANTARO DE LA INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ:** Gabriel Mora i Ara-  
na (prezidanto), William Auld, Jordi Carbonell i Pinyol, Timothy Brian Carr (florluda majstro),  
Manuel Casanoves i Casals, Bernard Golden (florluda majstro), Salvador Gumà i  
Clavell, Miguel Gutiérrez Adúriz, Abel Montagut i Masip, Giorgio Siffer (florluda majstro),  
Krystina Ungar (florluda majstro), Joan Ramon Guifón i Roset (sekretario).

**FLORLUDAJ MAJSTROJ:** Clarence Bicknell (3aj IFL, Olot 1913), Artur Domènech  
i Mas (6aj IFL, Reus 1916), Marià Solà i Montserrat (6aj IFL, Reus 1916), Josep  
Ventura i Freixas (8aj IFL, Olot 1921), Jaume Grau i Casas (9aj IFL, Manresa  
1923), Bernard Golden (20aj IFL, Vilanova i la Geltrú 1980), Giorgio Siffer (24aj IFL,  
Olot 1984), Timothy Brian Carr (28aj IFL, Barcelona 1988), Krystina Ungar (30aj  
IFL, Palamós 1990).

**PEDAGOGIA KOMISIONO:** Lluís de Yzaguirre, Abel Montagut, Joan Torres, Jo-  
sep Tordera, Manuel Marqués.

**VORTARA KOMISIONO:** Jordi Carbonell i Pinyol - av. Paral.lel, 96-6è - tel. (h)  
329.24.81, (l) 441.94.11 - 08015 Barcelona.

**KOMARKAJ DELEGITOJ:** Garrotxa, Ripollès: Joan Torres i Nalda - Escola Llar -  
Ctra. de la Canya, s/n - tel. (972)26.38.29 - 17800 Olot (Garrotxa); Gironès, Alt  
Empordà, Baix Empordà, La Selva: Ĝirona Espero - Apartat 509 - 17080 Girona  
(Gironès); Tarragonès, Alt Camp, Baix Camp: Josep M. Serrano - Apartat 482 -  
43080 Tarragona (Tarragonès); Baix Ebre, Montsià: Josep M. Altadill - Berenguer  
IV, 23 - tel. (973)44.20.09 - 43500 Tortosa (Baix Ebre); Illes Balears: Xavier Mar-  
gals i Basí - Orient, 60 - tel. (971)61.38.30 - 07110 Bunyola (Mallorca); Catalunya  
del Nord: Joan Fernández - Henri Matise, 21 - 66000 Perpinyà (Rosselló).

**KOLEKTIVAJ MEMBROJ:** Centre d'Esperanto Sabadell - Apartat 407 - Papa  
Pius XI, 130 - tel. (93)716.36.33 - 08200 Sabadell (Vallès Occidental); Centre d'Estu-  
die de la Biblioteca-Museu Balaguer/Esperanto-Grupo - St. Gervasi, 45 -  
08200 Vilanova i la Geltrú (Garraf); Centre Excursionista Puigcastellar/Esperan-  
to-Grupo - St. Josep, 20 - 08922 Santa Coloma de Gramenet (Barcelonès); Club  
d'Amics de la Unesco de Catalunya/Esperanto-grupo "Miquel Vilagrà" - Ma-  
llorca, 207-pral. - tel. (93)453.95.07 - 08036 Barcelona (Barcelonès); Esperanto-  
Centro Tarragona - Apartat 1236 - 43080 Tarragona (Tarragonès); Esperanto-  
Fako "S. C. Jovenut Terrasença" - St. Francesc, 52 - 08221 Terrassa (Vallès  
Occidental) - Esperanto-Grupo "Josefo Anglès" - Apartat 336 - 08190 Sant Cu-  
gat del Vallès (Vallès Occidental); Firma Tero Esperanto-Fako Centre Comarcal  
Lleidatà - Gran Via, 592 - 08007 Barcelona (Barcelonès); Grup Esperantista Sant  
Pau d'Ordal - Dr. Zamenhof, 12 - tel. (93)899.30.33 - 08739 Sant Pau d'Ordal  
(Garraf); Ĝirona Espero - Apartat 509 - 17080 Girona (Gironès); Hispana Espe-  
ranto-Fervojista Asocio - Apartat 15027 - 08080 Barcelona; Secció d'Esperanto  
Centre d'Estudis Comarcals d'Igualada - Baixada de Sant Nicolau, 21 - 08700  
Igualada (Anoia).

Dipòsit Legal: B-27362 - 1982. Presita ĉe Ràpid Graf. (93)725.50.91. Sabadell.

**D**um tiuj monatoj la ekstera esperanto-vivo kva-  
zaŭ iom malvigligis. Se la junuloj renkontigas  
aŭ la instruistoj kunvenas, tio ne plu estas  
novaĵo, ĉar farigis regula.

La katalunaj esperantistoj ekpretigas sin por la  
grandaj someraj aranĝoj en nia lando: la Internacia  
Literatura Forumo kaj la Universala Kongreso de  
Esperanto. Anonciĝas du imponaj verkoj: Poemo de  
Utnoa kaj antologio de la verkaro de Ausias Marc.  
Ankaŭ la organiza laboro streĉiĝas.

Sed se en Katalunio la esperanta vivo iom sub-  
terĝis, en Okcitanio ĝi eksplodis kolosale. Bonvolu  
legi pri la Prima de las lengas en la dorskovrilo!

Rimarku ankaŭ, ke la Kataluna Kongreso de Es-  
peranto forlokiĝis al decembro, por solvi la samtem-  
pecon kun alia esperanto-aranĝo en Katalunio.

Pacienca do ĝis julio!

### Concurs d'idees

La nostra Asociació té la intenció de canviar la  
capçalera històrica de la nostra revista *Kataluna Es-  
perantisto*. La raó és donar una imatge de moderni-  
tat a la revista i al moviment esperantista.

Per això, la Junta de l'Asociació convoca un  
concurs d'idees per a una nova capçalera de la re-  
vista. Aquesta haurà de contenir el nom *Kataluna  
Esperantisto*, sense ser necessària la frase oficiala  
organo de Kataluna Esperanto-Asocio. Tampoc no  
és obligatori cap símbol, com l'anagrama de l'Asso-  
ciació, l'estrella de cinc puntes o el símbol del cen-  
tenari de l'esperanto, encara que tots ells poden for-  
mar part de la capçalera.

El límit per presentar les propostes és el 15 de  
setembre de 1993. La capçalera guanyadora s'utili-  
zarà a partir del primer número de la revista del pro-  
per any.




**Kataluna Kongreso de Esperanto en decembro**

Nia Asocio decidis ŝanĝi la datojn de sia kongreso al decembro pro la tempa kolizio kun alia esperanto-aranĝo en Sant Cugat del Vallès. La Kongreso okazos de la 4-a ĝis la 7-a de decembro en Alcúdia.

Georgo Kamaco, elstara verkisto kaj plej juna membro de la Akademio de Esperanto ekde ĝia fondiĝo, fest-prelegos en la Internaciaj Floraj Ludoj.

KEA sukcesis havigi al si allogajn prezojn por komunaj vojaĝo el Barcelono kaj loĝado en Alcúdia. Vidu la aligilon -kaj ne malfruigu anonci vian partoprenon por ĝui la anoncitajn prezojn! □



La aŭtentaj "murades"

**12-a Internacia Literatura Forumo**

La 12-a ILF okazonta en Club d'Amics de la Unesco de la 18-a ĝis la 21-a de julio jam anoncis siajn unuajn prelegantojn: Marco Botella (*La poezio kaj la virino en al-Andalus*), Miguel Fernández (*Sur la spuroj de Federico García Lorca*), Georges Lagrange (*Kiel recenzi esperanto-teatraĵojn*), Georgi Miĥalkov (*La esperantaj literaturaj kritikoj de Kálmán Kalocsay*), Abel Montagut (*La kataluna literaturo en esperanto*), Gonçalo Neves (*Literatoroj kaj publiko en Esperantujo: ĉu konkube aŭ divorce*), Giorgio Silfer (*La turo de babilo: poe-*

*tikoj kaj tendencoj en la esperanto-kritiko*), Walter Zelazny (*Cenzuro kaj memcenzuro en literaturo*). Ĉiuvespere, Judita Schiller gvidos *itineron tra nia filmkulturo*.

Baldaŭ aliĝu! □

Kiel anoncite, la KEA-membroj super 30 jaroj ricevos la prestiĝan revuon *Literatura Foiro*. La unua numero por 1993 surhavis kovrile tiun homturon, kiu aludas la katalunan kunlaboron kun Kooperativo de Literatura Foiro.



**Stato de la Fondaĵoj**

Fondaĵo Eldonaĵoj	
Antaŭa stato .....	40.300
Anonimulo.....	10.000
Entute .....	50.300
Fondaĵo Floraj Ludoj	
Entute .....	13.000

**Proksimaj esperanto-aranĝoj**

- 4-a Kongreso de Valencio kaj Murcio Xest-Cheste (Foia de Bunyol), 30an aprilo-2an de majo
- Franca Kongreso Pau (Gaskonio, Okcitanio), 8-11an de majo
- Kongreso de la Federacioj de Langvedoko-Rusiljono kaj Meznordaj Pireneoj kaj Sud-Franca Junulara Esperanto-Renkontiĝo Limós (Langvedoko, Okcitanio), 15-16an de majo



## Elstara sabadelano



Aperis pasintjare la libro *Més ceballuts*, kiu prezentas la 65 plej famajn loĝantojn de la 200.000-homa urbo Sabadell. La verko estas duone ŝerca duone serioza: ĝi enhavas por ĉiu gravulo pikan poezion, tutpaĝan karikaturon kaj mallongan biografion.

Inter la tuta *Sabadell* vicas unu esperantisto: Libert Puig i Gandia, ĝenerala sekretario de KEA kaj multjara esperanto-aktivulo. Ni gratulas lin pro lia justa renomo, kiu prestiĝigas nian Asocion. □

## Pedro Martín premiita

Nia aktivulo Pedro Martín Burutxaga ricevis laŭron la pasintan 7-an de januaro en la konataj premioj Sant Ramon de Penyafort, aljuĝitaj ĉi-jare la 21-an fojon en Vilafranca del Penedès. Lia studo *Història del moviment esperantista al Vendrell* (*Historio de la esperanto-movado en El Vendrell*) meritis premion en la branĉo *mallonga eseo*. La novaĵo aperis la sekvan tagon en la regiona revuo *El tres de vuit*.

La aŭtoro, mem el El Vendrell, laboris super la historio de la esperanto-movado en sia urbeto dum pluraj jaroj. El Vendrell tenis agadon por

esperanto inter la jaroj 1907 kaj 1936. Elstara pinto de la tiea aktivado estis la okazigo de la 16-a Kataluna Kongreso de Esperanto kaj la 15-aj Internaciaj Floraj Ludoj en la jaro 1933. Kelkaj anekdotoj (kiel la enkarcerigo de la kartvela esperanto-verkisto Ciklari en El Vendrell post la Barcelona UK) jam aperis en *Kataluna Esperantisto*. Aparte interesa estas la partopreno de Andreu Nin en la starigo de la esperanto-grupo *Frato* kaj lia enmovadiĝo ekde la jaro 1908 ĝis lia transloĝiĝo al Barcelono, kie li kelkatempe plu membris en la klubo *Barcelona Stelo*.

La verko estas tre abunde dokumentita. La aŭtoro vizitadis arkivojn kaj devis tralegadi malnovajn revuojn, ĉar parolaj fontoj mankis. Ni devas parte mencii la helpon de la Esperanto-Muzeo de Sant Pau d'Ordal. La profundeco de lia 24-paĝa studo, meritigis al Pedro Martín tiun premion. □

## Poemo de Utnoa eldonata

La vasta versa epopeo de Abel Montagut, parte aperinta tra la tuta esperanto-gazetaro kaj ankaŭ en *Kataluna Esperantisto*, eldoniĝos ĉe la aŭstra eldonejo Pro Esperanto. KEA subtenas la publikigon de la verko per ĝia kompostado kaj finance per rimedoj el sia *Eldona Fondaĵo*.

*Poemo de Utnoa* estas jam finkompostita kaj momente kuŝas ĉe hungara presisto. La eldonisto Herbert Mayer certigis, ke la verko povos prezentiĝi en la Internacia Literatura Forumo, kiu okazos julie en Barcelono. La verko estos aĉetebla ankaŭ dum la Universala Kongreso en Valencio. □

## Informe pri Valencilando

*Etnismo, informilo pri etnaj problemoj* eldonita de IKEL aperigas en sia lasta numero (n-ro 52, 21.12.1992) artikolon de Hektor Alos i Font pri *La nuna situacio de la kataluna lingvo*, kies resumo aperis en la pasinta *Kataluna Esperantisto*. Akompane ape-

ras unupaĝa mapo kaj la teksto de la Rezolucio pri la UK subskribitan de katalunaj esperantistoj (vidu la pasintan KE). Resumo de la IKEL-artikolo aperas finne en *Esperantolehti* (januaro 1993).

La sama Rezolucio aperis ankaŭ en *Eventoj* (n-ro 17, novembro 1992) kaj *Literatura Foiro* (n-ro 141, februaro 1993).

Artikolo de Toni Royo (*Valencilando: kompleksa nacia realo*), aperinta en la pasinta KE, eldoniĝis ankaŭ ĉe *Monato* (aprilo 1993). Pli frue, en *Esperanto* (decembro 1992) elstare publikigis artikolo de Georgo Kamaĉo kun la titolo *Kie situas Valencio?*. □

## Kastilia Dua Bulteno

Kvankam *Kataluna Esperanto-Asocio* ankoraŭ ricevis eĉ ne unu UK-aligilon, *Unuan Bultenon* aŭ *Duan Bultenon* ili iel atingas nin. Dum la *Unua Bulteno* listigis gapiĝajn kretenaĵojn (i.a. la ekziston de iuj andalusa kaj valencia lingvoj), la lasta UK-eldonaĵo, la *Dua Bulteno*, rekte kontraŭas la Rezolucion subskribitan far sesdeko de KEA-membroj en oktobro: ĉiuj loknomoj estas en la hispana lingvo. Eĉ ne unu estas en la kataluna (krom la adreso kaj nomo de la kongresejo kaj iu *Alakanto*). Ili, cetere, speciale abundas en tiu broŝuro, ĉefe titolo, ĉar oni listigas ĝis 13 dumkongresaj ekskursoj! Jen ni trovas: Sagunto, Vall de Uxo, Benicassim, Peñíscola, Alicante, Elche, Miguelete, "Turoj de Serranos", Lonja, "Muzeo de San Pio", "Muzeo Fallero" k.a. Ni rimarku, ke UEA-oficistoj ja scias, kiel oni nomas almenaŭ Alacant kaj Elx, i.a. pro la Rezolucio. Se oni elektis hispan-lingvajn formojn tio ne estas hazardo.

Aparte amuze estis, ke du fotoj sarkame aperintaj frontpaĝe de la pasinta *Kataluna Esperantisto* lokigis ankaŭ en la *Dua Bulteno*, kio substrekas la folkloremon de la tuta UK.

Evidente UEA tute fajfas pri realaj lingvo-problemoj (ne mucidaĵoj en luj oficistaj kunvenoj) kaj preferas abunde enkasigi per aparte pagendaj turismaĵoj.

Hektor Alos i Font



## Eksigo

Sr. Josep Franquesa, President de KEA

Benvolgut senyor:

Acabo de rebre *Kataluna Esperantisto* dels mesos novembre-decembre, i la seva lectura em fa prendre la dolguda decisió de donar-me de baixa de KEA.

He estat membre de KEA i de KAE al mateix temps, sempre amb l'esperança que algun dia s'arribaria a eliminar les diferències que separen les dues associacions. Malauradament penso que l'escrit *Kiel mortigi la esperanto-movadon en Katalunio*, juntament amb altres anteriors, faran impossible la reconciliació.

No és ètic, ni democràtic, ni de bona educació blasmar, insultar i burlar-se d'esperantistes veterans que han dedicat moltíssimes hores de la seva vida a la difusió de l'esperanto.

Una revista que publica insults i comentaris vexants dirigits a persones formals i honestes desqualifica a la institució que la posa en circulació.

Zamenhof va crear l'esperanto amb l'esperança que ajudaria a que els humans ens respectéssim els uns als altres.

Desitjant que en el futur no permeteu la publicació d'articles semblants, us saluda atentament

Martí Guerrero i Cots

*Pri demokratio, la redakcio de KE atentigas, ke en nia bulteno aperis pli akraj kritikoj kontraŭ la KEA-agado mem. Aliflanke KAE-informilo kaj Boletín rifuzis publikigi senpartiajn artikolojn pri la televidkurso en Sabadell.*

### "Kaldrono ridas pri pota kaj mem estas kota"

S-ro Bernard Golden kritikis *Katalunan Esperantiston* pro tio, ke ĝi signalis hungarismojn en revuo *Eventoj* kaj mem nacilingve paŭsas. Jen lia listo de la signalitaj eraroj: *majorantino* devus esti *majoratulino*;

*tralaborita* devus esti *reverkita* aŭ *reviziita*; *standardigi* devus esti *normigi*; *dedukti* (sur p. 10) devus esti *indukti*; *ampleksigi* devus esti *ampleksi*; *ehis* (p. 12) devus esti *ehigis*; *sia* en la frazo "dua ebleco estus enkonduki nur unu subtenanton per sia foro kaj etega teksto" (p. 19) devus esti *lia*.

La redaktoroj de *Kataluna Esperantisto* tre dankas lian atentan rigardon de nia bulteno. Ili tamen rimarkigas, ke la neologismo *standardo* en la senco *normo* enkondukiĝis en multajn okcidenteŭropajn lingvojn, fariĝinte internaciismo laŭ la 15-a regulo de la Fundamento, kaj mem estis uzita i.a. de akademiano de Kock en revuo *Esperanto*.

### Esperanto en La Vanguardia

Dimanĉon la 14-an de marto aperis en la ena suplemento de la kastililingva ĵurnalo *La Vanguardia* de Barcelono duona paĝo pri esperanto. Titole oni atentigis, ke Valencio akceptos la Universalan Kongreson, dum du fotoj ornamis la artikolon: tipa libro-foto (kie *La ingenia hidalgo* centre kuŝis apud *La homa vivaventuro*) kaj la nemalhavebla foto de nia majstro *Luis Zamenhof*.

La artikolo estas nemalbona, kvankam ĝi enhavas folklorajn kaj eraretojn, kiajn verŝajne ni devos ĉiam suferi, kiam ekstera ĵurnalisto pritraktas esperanton. La artikolo finiĝas per superflua amasego da adresoj (bedaŭrinde multaj apenaŭ funkciantaj), en kiu mankis tiu de *Kataluna Esperanto-Asocio* kaj *Girona Espero*. Ankaŭ *Foment Martinenc* nekompreneble aperis en la hispana. Aparte elstaras Sabadell, kiu ŝajne havas kvin lokajn grupojn (*Centro de Esperanto* aperas nur per sia postkesto) kaj Terrassa, kun tri adresoj. Tio igas la tutan artikolon por ĉiu serioza esperantisto ridinda kaj misinforma. Kion celas la klicko, kiu tiel agis? Ĉu ĝi neniam hontos pri similiaĵoj?

Hektor Alos i Font

### TEJO ne toleras Katalunion en Pasporta Servo

*Kelkaj gastigantoj de Pasporta Servo renovigis sian aliĝon kun la kondiĉo, ke ili aperu sub kataluna lando. Tiun peton jam oni senrezulte faris en aliaj jaroj, sed neniam oni estis kondiĉiginta la aliĝon al tio. La respondo de la Prezidanto de TEJO al Juvenal Puig, Carles Berga i Molina, Hèctor Alòs i Font, Ferriol Macip i Bonet kaj Centro de Esperanto Sabadell estis la jena:*

Kara gehomoj,

la redaktoro de *Pasporta Servo* (PS) Rob Keetlaer, informis la TEJO-estraron pri via deziro aperi sub aparta landa rubriko *Katalunio*. Kvankam kelkaj el vi pli frue aliĝis kaj simple menciis "Katalunio" kiel landon sur la formularo, ni komprenis el la posta letero de Hèctor kaj Ferriol, ke por vi ĉiuj la aparta apero sub *Katalunio* estas kondiĉo por aliĝi al PS.

La Estraro diskutis ĉi tiun demandon dum la Internacia Seminario en Germanio. Ni konsideris multajn flankojn de la afero: i.a. la fakton, ke TEJO havas Landan Sekcion en Katalunio; la verŝajnon, ke multaj partoprenantoj en la UK en Valencio antaŭe aŭ poste ŝatus viziti la regionon de Barcelono; la facilecon por la uzantoj trovi la bezonatajn informojn en la PS-libro; kaj la riskon, ke esperantistoj el aliaj regionoj aŭ federaciaj ŝtatoj venos al similaj petoj venontjare.

Finfine la lasta argumento plej pezis, kaj ni decidis ne komenci novan politikon per la starigo de aparta rubriko *Katalunio*; kaj do (laŭ via peto) ni ne povos aperi viajn adresojn. Kvankam TEJO estas sentema pri la rajtoj de minoritatoj (speciale lingvaj minoritatoj), ni konsterniĝas pri la horora batalado en eks-Jugoslavio, en la Kaŭkaza regiono, en Somalio kaj tiel plu kaj plu. Jes, ĉiuj tiuj situacioj estas malsamaj, sed ili ankaŭ iel similas; estus tre maloportune, se TEJO nun farus signon (eĉ se temas pri malgranda eldonajo kiel PS), kvazaŭ kuraĝiganta la 'sango-soifan' nacismon, per kiu oni kelkloke provas dividi la mondon en ĉiam pli et(n)aj pecoj. Espereble vi kom-



prenas, ke ni ne celas kritiki Katalunio aŭ la katalunojn; via peto devigis nin rigardi la problemon pli grandskale, kaj tiel ni venis al ĉi tiuj konsideroj.

Ĉar la UK'93 okazos en Valencio, estos tre bedaŭrinde, se vojaĝemuloj ne havos la ŝancon konatiĝi kun viaj urboj kaj la regiono; pri la speciala situacio de Katalunio vi persone povus plej bone klarigi al viaj gastoj. Mi petas vin rekonsideri vian aliĝon kiel gastiganto de PS: ĉu pli gravas propagandi memstarecon de Katalunio, aŭ la ebleco konatiĝi kun esperanto-amikoj, kiuj certe tre ĝojus gastigi ĉe vi? Vi povos ankoraŭ rapide kontakti la PS-redaktoron pri tio.

Amike salutas

Saskia Idzerda

## ***Kial mi ne aperas en Pasporta Servo***

Mi estas unu el tiuj homoj, kiuj kredas tion, ke esperanto estas io pli ol lingvo.

Mi lernis la lingvon, ne pro ĝia facileco aŭ pro tio, ke ĝi lerneblas senpage.

En la jaro 1982, kiam mi finis la militservon, mi sentis koleron, ĉar mi tute stulte perdis unu jaron de mia vivo kaj, krome, kontribuis al militema sistemo, t.e. mi iel apogis sociordon bazitan sur la subpremo de iuj popoloj far la aliaj.

Tial mi lernis la lingvon de Zamenhof. Mi volis helpi al egaligo de la popoloj.

Mi estas kataluno. Mi apartenas al popolo, kiun mi ne elektis, se mi lernis ami ĝin. Plejmulto el mia familio naskiĝis en la sama lando. Ĝis preskaŭ 15-jara mi estis devigata en lernejo paroli nur hispane kaj enkapiĝi, ke Hispanio estas *unu, granda kaj libera*. Post kun la alveno de demokratio, mi sciis, ke Hispanio ne estas *unu*, ke ĝi ne estas tiel *granda* kaj ke oni rajtas dubi pri *libera*.

Kun demokratio alvenis konscio pri homaj rajtoj kaj mi komprenis, ke mi rajtas esti kataluno kaj ke miaj amikoj kaj familianoj ankaŭ rajtas. Mi komprenis, ke tio, kion mi parolas,

ne ne estas hejma slango sed lingvo, ke muziko kaj danco malsamas de unu regiono al alia, ke niaj jurkutoj ne koincidas laŭhistorie kun tiuj de aliaj regionoj, ke Mediteraneo kaj Eŭropo speciale influis nin.

*Hispanio* estas ne-neŭtrala esprimo. Ĝi estas referencpunkto de iu sociordo, kiu taŭgas por tenado de difinita mondkoncepto.

Mi ne volas esperanton por gramatikumi, sed por esprimi mian propran mondkoncepton kaj, laŭeble, tiun de miaj proksimuloj.

Tial mi petis al respondeculoj de *Pasporta Servo*, ke mia nomo aperu sub la rubriko *Katalunio*.

TEJO kunvenis kaj decidis "...ne komenci novan politikon" laŭdire por ne kvazaŭ-kuraĝigi aliajn regionojn aŭ federaciistatojn peti la samon.

Je tiu punkto mi konfuziĝas. Kial, do, TEJO akceptis, ke Katalunio estu Landa Sekcio?

Antaŭ tiu malkongruo mi preferas provizore resti ekster *Pasporta Servo* kaj samtempe mi invitas esperantistojn kaj ne-esperantistojn viziti nian landon. Mia hejmo vias.

Carles Berga i Molina

## ***Replika letero***

Saluton Saskia,

Mi estas la redaktoro de *Kataluno*, la revuo de Kataluna Esperanto-Junularo (KEJ), kies antaŭa respondeculo estis Arnau Torras i Tututusaŭs.

La kialon skribi al vi serĉu en la nea respondo al la peto de kelkaj membroj de KEJ esti rekonitaj kiel *katalunaj* kaj ne *hispanaj* gastigantoj. Alòs, Berga, Macip, Puig kaj la Centro de Esperanto Sabadell kondiĉis la aliĝon al nepra aperigo sub Katalunio, sed vi ankaŭ kaj finfine kondiĉis sukcese al nek aperigo en Katalunio -kiel kore dezirate de ili-, nek deviga malkontentiga aperigo en Hispanio.

Kvankam mi nek subskribis la peton, nek -momente- povas/volas gastigi nekonitojn ĉe mi pro grandaj problemoj kun justico, mi senhezite solidariĝas kun miaj samnacionoj kaj ties prava emo kaj je persona nivelo dubas pri la taŭgeco de via decido.

La nia, tute ne estas -kiel vi bone scias- fuŝa aŭ fantoma nacio; male ĝi estas miljara mediteranea lando hodiaŭ tranĉita laŭvole de du ŝtatoj en kelkajn absurdajn komunumojn kun respektive absurdaj provincoj. Aliflanke, kaze ke vi bezonus legajn argumentojn, tiuj ne mankos al vi ĉar Katalunio estas jura estaĵo (ne nur geografia aŭ folkloro) dank' al jaroj da malfacila laboro de tiuj, kiuj luktis por pli libera lando. Ĝi memstare zorgas pri sano, edukado justico ktp. kaj tiel certe vi ne havus problemojn kun kiu ajn ĉar lege Katalunio ankaŭ ekzistas. Tamen vi argumentas por malagnosko ne legas sed moralan kialon(!): vi timas, ke ni estos la unuaj el ĉeno da voremaj naciistoj, *pardonante* nin, ĉar tamen ni estas bonkoraj kaj landsekciaj. Dankon.

Ankaŭ ni -kiel vi- konsterniĝas pri la nunaj militoj en la tuta mondo ne nur pro naciismoj sed ankaŭ pro intereso de potencoj, kia estas la Eŭropa Komunumo gvidata de Germana Ŝtato (kial milito en Bosnio kaj ne en Kroatio aŭ Slovenio?). Sed konsterniĝo pro putriĝanta mondo ne pravigas malagnoskon de historia lando, des pli en sengrava minoritata adresaro, kiun ne legos Miloseviĉ aŭ Pol Pot... Tio estas kvazaŭ kontraŭ tuso skrapo la stomakon.

Kio vere ĝenas min estas la komforta kaj facilega sinekskuzado sub la deksepa regulo netuŝebla: la neŭtraleco. Via sankta neŭtraleco estis la ekskuzo/kaŭzanto de detruo de legitime elektite respubliko far voremaj faŝistoj tragedie fifama milito en la Hispana Ŝtato de 1936 ĝis 1939. La tiama diktatoro, generalo Francisco Franco Bahamonde, jarojn poste honore prezidis Universalan Kongreson, kie UEA fiere festivalis dum en la stratoj miloj luktis, pereis aŭ malliberiĝis batalante kontraŭ tiu vizaĝo de la hontgalerio de la esperanto-movado, kiu rekte kulpis pri la morto de centmiloj. Tiu neŭtrala dumorale kaj hipokriteco permesas al UEA-influreto ne agnoski katalunan, kanarian, bretonan, laboristan, feminisman aŭ samseksaman realojn. Vi nin ne rekonas entute kaj sentime, ĉar -laŭ vi mem- vi ne volas *kuraĝigi sangosoifan naciismon...* dum oni mute kaj sobre bone aŭskultas uso-



najn petojn sen neniel kulpi E-usonanojn pri la monda ĝendarmado de iliaj regantoj aŭ pri la fanfaronado de ilia armeo en somalia teritorio sub beno de pli kaj pli senutila UN. Kiun sangosoifan naciismon vi atakas: Tiun de israela armeano aŭ tiun de palestina knabo? Tiun de F-18 aŭ tiun revitan araban nacion? Tiun de Beograd aŭ tiun de Sarajevo? Tiun atakantan aŭ tiun sin defendantan?

La sinteno de la UEA-lobio rilate al tiuj temoj ekstreme ridindas, ĉar ĝi baziĝas en simpla akceptado de la nuna monda *status quo*, kvankam ĝi estas horore terura. Redifiniĝu aŭ tiam ripetu antaŭajn erarojn, ĉar la neŭtralisma mensogo ne plu kredeblas de antaŭ jaroj. Mi rifuzas esti neŭtrala; mi preferas esti **objektiva**.

Ĉiukaze mi esperas iam persone koni vin por pli precize kaj pli varme esprimi, kion mi pensas pri ĉio ĉi kaj aliflanke tiu estas mia propra juĝo de tro ofta UEA/TEJO-konduto rilate al ni, katalunoj, internaciemaj kaj gastamaj sed fojfoje izolitaj nur ĉar ni volas esti tio, kio ni fakte estas kaj ne kion aliaj volus.

Sanon, kisojn kaj trouzojn!

Felip Artero i Lozano

### Raporto de la agado de KEJ dum la jaro 1992

(prezentita dum la KEJ-Asembleo en Mura)

Dum 1992 KEJ eknormaligis sian situacion interne kaj malinterne. La estraro, precize la kasisto Josep Maria Milla, ekklarigis la membrarsituacion kaj, pro tio, la ekonomiajn aspektojn de nia asocio. Dum tiu asembleo li mem montris ĝin, kiu certe ne estas tro ĝojiga.

Ankaŭ la ekonomia situacio ekklarigis kaj eknormaliĝas. Ni enspezis, unue kaj bloke, la antaŭajn kotizojn (po 2.000 p-toj) kaj krome enspezis la 1992-an (po 1.600 pt-oj). Tiamaniere la financa situacio de KEJ normaligis kaj nun ni povas respondi pri niaj devoj al TEJO kaj al KEA. Sed pri tiu financa punkto poste pluinformos ankaŭ la kasisto.

Rilate al la malinternaj situacio kaj rilatoj de KEJ, menciindas al vi,

### "Se ni ne ampleksigas nian agad-sferon kaj niajn agadojn mem, eble ni povas malaperi post kelkaj jaroj"

geanoj de KEJ, la tutan normaligon de niaj ekonomiaj rilatoj kun KEA, kiel denove la kasisto raportos poste.

Ni povas anonci ankaŭ, ke la rilatoj kun TEJO (re)komenciĝas. La estraro sendis leteron al la estraro de TEJO, por ke ili sciigu al ni nian situacion ĉe TEJO. Ni ricevis la respondon antaŭ kelkaj tagoj. Do, vi devos atendi nian studon de la letero, por scii precize la situacion de niaj rilatoj kun TEJO.

KEJ ankaŭ revigligis dum 1992 la rilatojn kun BEJ (Bulgara Esperanto-Junularo) okaze de la IJK en Vraca venontsomere. Ni efektivigis kontrakton kun la Vraca LKK, kiu igas nian asocion kontizperanto de Vraca'93. Aliflanke, la LKK petis nian kunlaboron en la IJK-organizado, kiun ni ofertis laŭ niaj ebloj.

Aliflanke, dum 1992 KEJ sekvis sian "renkontiĝ-politikon" tri-foje. Du el tiuj renkontiĝoj estis diskut-kunvenoj -la unuaj, kiujn ni organizas. Ilia evaluo estas sufiĉe pozitiva kaj tio kuraĝigis nin organizi aliajn venontjare.

La unua okazis en Can Rocavell (Llçà d'Amunt) la 7-8-an de marto. Kunvenis 30 partoprenantoj sub temo *Kulturaj valoroj de esperanto*. Ni devas rimarki, kaj danki, la partoprenon de kelkaj eks-keĵuloj.

La dua okazis en Can Fulló (Òrius) la 28-29-an de novembro. Kunvenis preskaŭ 30 personoj pri temo *Informado*.

Sed KEJ ankaŭ renkontiĝis amuze foje en la ekskurso al la Marĉoj de Empordà okazinta en Casa de Colònies El Padró (Ventalló) la 4-5-an de julio.

Aliflanke, ankaŭ dum 1992 KEJ daŭrigis la eldonon de sia gazeto *Kata Luno*. Ĝia redaktoro Felip Artero eldonis kvar numerojn revenantajn al la alternativ-linio de la Arnaŭa *Kata Luno*. Sed KEJ ankaŭ ekeldonis sian unuan katalunlingvan revuon *Freqüencies*. Aperis jam la tri unuaj numeroj, iomete maloftiĝintaj, sed eldone kvalitaj kaj sufiĉe bone inform-enhavaj.

La agado de KEJ finiĝis tie kaj tiel, kaj nenion alian ĝi faris dum 1992: nek kursojn, nek seminariojn, nek ion alian. Tiu situacio devas atentigi nin pri nia futuro kiel asocio, sed ankaŭ kiel esperantistoj. Se ni ne ampleksigas nian agad-sferon kaj niajn agadojn mem, eble ni povas malaperi post kelkaj jaroj. Kaj ne estas tio la problemo esence, ĉar nia malapero estus normala pro plenaĝigo: la problemo estus, se nia malapero signifus la malaperon de la juna asocia esperanto-movado en Katalunlandaro. Do, la problemo gravas, kaj ni devas pripensi ĝin serioze.

Carles Vela i Aulesa

### Situacio de la KEJ-membraro (prezentita en la KEJ-Asembleo)

Gekarĉoj, jam de antaŭ kelkaj monatoj mi respondeculas (estas diro) pri monaj aferoj en nia a-socio. Ne necesas diri, ke tiu situacio estas vere privilegia: oni tramanhavas monegon, enslipigas datenojn de ĉiu gesocietano kaj eĉ scias telefonon de ĉiu keĵano!

El tiu privilegia posteno oni povas hektorumi superrigardante evoluon de ano-soci-rilatoj: ĉu oni pagis?, ĉu oni ŝanĝis adreson?, ĉu oni ŝanĝis fianĉon?, ĉu oni jam faris la promesitan raporton? Necesas diri ke mi, kompreneble, falis en tenton. Jen la rezulto:

- fantomaj membroj ĝis la antaŭa kasisto: .....71 inoj:..... 30 = 42% malinoj:..... 41 = 58%
  - meza oldeco: .....22 jaroj
  - plej beba aktivulo dum 1989:..... 16 jaroj (Felĉjo)
  - boljikauloj dum 1989:.. 16 = 22.5%
- \*\*\*
- gemembroj emerigitaj januare 1993:..... 11 = 15.5%
  - gekabeintoj, gevolapukistoj, gefiidistoj kaj ĉiuj aliaj sakraĉaj elmovadiĝuloj:..... 26 = 36.5%
  - entutaj malaliĝoj:..... 37 = 52%
  - novaj genaivuloj trompaligintaj dum 1992:.....6



- nuna membro-nombro: .....40  
inoj: ..... 17 (-11) = 46% (+4%)  
malinoj: ..... 21 (-20) = 54% (-4%)
- meza oldeco: .....24,5 jaroj (+2.5)
- plej beba aktivulo:  
.....20 jaroj (+4) (ankoraŭ li)
- boljikauloj: .....8 = 20.5% (-2 %)
- laŭ landoj:  
andalusaj: ..... 2 = 5%  
valenciaj: .....0  
balearaj: ..... 3 = 8 %  
katalunaj: ..... 34 = 87 %

## Prikomentoj (nur por gemasokistoj)

Kiel vi povas vidi (se vi ne blindas), nia asoclando, asocujo aŭ asocio (ni demandu al Bernard Gulden) perdis subite kaj sensolve pli ol duonon de sia anaro. Kontraŭ tio ni sukcesis kunvenki nur ses homojn enmovadiĝi. Laŭ tiu ritmo, kaj konsiderante la mezan oldecon en KEJ, baldaŭ restos nur la infanoj ("boljikauloj"), kiuj estas ok.

Pri sekso (sekseco kaj seksuado) necesas diri, ke proporcio inter inoj kaj malinoj ekvilibriĝas dank'al ega grandigo de nia Kazimierz Bein-fako. Kompreneble devintus esti male: ara aliĝo de ĉiuspecaj ulinoj. Do, karulĉoj, ek al fik', kaj Afrodito bonzorgu vian aligtaskon!

Rilate al landoj, estas prizorginda la fakto, ke nun eĉ ne unu valenciano KEJwanas. Via jena servanto konfesas sin nekapabla konvinki geburĝotanojn aliĝi al KEJ, kaj proponas ŝanĝi asocinomon al VEJ (a vore si aixinal). Aliflanke, ni komencis rekonkeri Andalusion: du el la plej elstaraj sevillaj esperantistoj, Francisco kaj Franco, forlasis fispanan esperanto-movadon por aliĝi al KEJ. Ili estu bonvenaj, kaj ni salutu ilin trifoje: FRANCO, FRANCO, FRANCO! kaj PAKO, PAKO, PAKO!. Nun mi instigas ĉiujn geKEJanojn por rekonkeri Murcion, okaze de renkontiĝo ĉe Felipes domesko. Mi memorigas al vi: kiu konkeris Murcion al la islamanoj? (Tiuj du lastaj frazoj celas nur pravigi Saskian. Katalunoj ja estas sangsoifaj naciistoj, jen la pruvo: niaj dentoj longiĝas, kiam ni pensas pri anekso. Eĉ mi dirus, se UEA ne hal-

## Esperanto-renkontiĝo en Limós

La 15an kaj 16an de majo okazos en Limós (Arièja, Langvedoko) *Sud-franca junulara esperanto-renkontiĝo*, organizata i.a. de Jorgos. Elstara programero estos publika debato franca kaj okcitan-lingva pri *Okcitanio, Katalunio, lingvaj regionoj de Eŭropo*, kiun prezentos Sèrgi Granièr pri la okcitana por Institut d'Estudis Occitans, Ferriòl Macip i Bonèt, redaktoro de *Freqüències*, pri la kataluna (en la okcitana) kaj Pierre Janton pri "dangero de potenca lingvo, kia la angla: kiel protekti la eŭropajn lingvojn?".

Planatas KEJ-karavano.

tigas nin, ni ne ripozos ĝis konkeri la tutan esperanto-movadon!

Kaj por fini, bonan novaĵon: kiam Katalunio estos sendependa, UEA akceptos agnoski nin. Dumo, la kasisto invitas vin kunripeti: que els bombin!

Josep Maria Milla

## Agadpropono por 1993

(prezentita en la KEJ-Asembleo)

Dum la jaro 1993 KEJ organizos kvar renkontiĝojn. La unua estas ĉi tiu mem, dediĉata al la asembleo, la 13-14an de februaro 1993 en Mura. La dua aranĝo, la 17-18an de aprilo, pri traktos la preparon de Vraca'93 en iu ankoraŭ nedifinita loko. La tria estos amuza kaj festa renkontiĝo en kavernoj en Murcia la 24-27an de junio. La kvara estos la tria diskut-kunveno de KEJ, ĉi-kaze Internacia KEJ-seminario pri *Sekso en esperanto*, okazonta de la 30-a de oktobro ĝis la 1-a de novembro en ankoraŭ nedifinita loko.

KEJ daŭrigos sian eldonpolitikon kaj aperigos tiom da Kata-Lunoj kiom al Filip plaĉos (tio estas 4-5).

## KEJ diskonigos en la kursoj

La KEJ-Asembleo profunde diskutis la formojn varbi novajn membrojn. Evidentiĝis, ke KEJ ne povas organizi siajn proprajn kursojn, sed ke ekzistas rimarkinda nombro de lokaj grupoj, kiuj jam organizas la siajn. La tasko de KEJ povus esti prezenti la esperanto-komunumon en tiuj kursoj (en simpla esperanto aŭ eĉ katalune), diskonigi la ekziston de KEJ inter la junaj kursanoj (kaj de KEA inter la malpli junaj) kaj inviti la lernantojn partopreni la renkontiĝojn. KEJ opinias, ke estas pli bone, ke ne la instruisto faru tiun prezenton, ĉar tiel pli facile oni povos kapti la intereson de la lernantoj.

Aperos ankaŭ la du ankoraŭ neaperintaj numeroj de *Freqüències* por 1992 kaj (ĉu eblas?) la kvar 1993-aj numeroj.

Rilate al eldonado, KEJ, laŭ la konkludoj de la dua diskut-kunveno, klopodos eldoni flugfoliojn kaj aliajn inform-materialojn por diskonigi niajn estecon kaj agadon.

Malinterne, KEJ finnormaligos (aŭ deziras finnormaligi) siajn rilatojn kun KEA kaj TEJO.

Rilate al la KEJa partopreno en Vraca'93, KEJ estas kotizperanto de IJK'93 kaj, se eblas, ĝi gvidos karavanan de València al Vraca tra Barcelona kaj Timisoara/Témésvar kaj organizos la adiaŭan vesperon de la IJK.

La estraro deziras ankoraŭ diskonigi nian estecon ĉe la katalun-nivelaj neesperantistaj organizoj kaj eĉ kunlabori kun ili, se eblas.

Bedaŭrinde, almenaŭ momente, nia asocio organizas neniun lingvan kurson. Kaj ni devus pripensi tion, ĉar certe estas nur la kursoj nia plej bona disvastiĝ-sistemo kaj nia nura reala estonteca ebleco.

Carles Vela i Aulesa

Tiucele pretiĝis unuflanke listo de la konataj kursoj en Katalunlandaro kaj, aliflanke, skripto por la prezentado. Tiuj ne estos nur formalaj prelegoj, sed inkluzivos disdonadon de revuoj, prezentadon de libroj kaj aŭskultadon de muziko, laŭ la tempo-eblecoj.

La kursoj vizitindaj por KEJ ne estas nur la Prindandaj, sed ankaŭ -laŭ la eblecoj- la Majorkaj, Valencilandaj kaj Rusiljonaj. Same KEJ ne celas nur la kursojn en KEA-grupoj, sed ĝi volonte vizitus, ekzemple, ankaŭ la kursojn ĉe BEC aŭ KAE.

Kurs-organizantoj bonvolu sin turni al KEJ (adreso kaj telefono sur p. 2). □



## Krize kaj krokize

En 1992 aperis du novaj libroj de Nemere en la esperanta merkato: la romano *Pigre pasas la nokto* (kiun mi ankoraŭ ne legis), eldonita de Fenikso, kaj la 58-paĝa rakontaro *Krokize de mia ĝardeno*, grandmformate kaj grandlitere eldonita de Literatura Foiro, kun bela kolora kovrilo reproduktanta pentraĵon de Cezanne.

La dorskovrila eldonista prezento de la rakontaro asertas, ke ĝi "povas esti konsiderata kiel aŭtenta verko de minimumismo, ĝenro ankoraŭ nova en nia literaturo". Oni permesu al mi intermeti komenton pri la reklama uzo de la vorto nova en nia gazetaro. Se per *minimumismo* oni volas diri, ke la kolekto aldonas minimumon al la originala esperanta beletra, nu, tiam estas klare, ke ĝi ne vere novas: ĉiujare aperas nova Manjo Austin por torturi paciencajn legantojn. Se tamen la celo estas klarigi, ke la aŭtoro en minimuma longo esprimas maksimumon enhavan kaj stilan, ankaŭ ĉi tiam la reklama noveco restas nur pretenda; tion jam faris, kaj kun pli da sukceso, ne nur Nemere mem en *La naŭa kanalo*, el 1981, aŭ lia samlandano István Ertl, aŭ la de mi bone konataj hispanaj kurtistoj Francisco Javier Moleón, María José Quesada, Alberto Franco kaj Liven Dek (*Trezo, Pandemonio, Sferoj 3, Sferoj 6, Nova Esperanta Krestomatio*): verdire granda parto el la lastatempa rakonta beletra en esperanto difineblas minimumisma, kaj ne lastvice por la influo de la Belartaj Konkursoj de Universala Esperanto-Asocio kun sia maksimuma longo je 200 x 65 tajpospacoj. Tiusence, kompare kun la nelge premiitaj rakontoj de Gonçalo Neves (aperontaj aŭ eĉ jam aperintaj ĉe *Bero* kun la titolo *Permesu*), enhave kaj lingve tre densaj, aŭ kun tiuj verkitaĵoj de la frumortinta Neil Salvesson, eblas klare diri pri *Krokize...*, ke en ĝi Nemere, kiel en sia romano *Terra*, nur minimume novas.

Laŭ PIV krokizo estas "rapida desegno aŭ pentraĵo, en kiu oni celas kapti nur la esencan similecon" (mia substreko). En *Krokize...* la rakontoj de Nemere, anstataŭ kapti esencojn, kroĉas sin al svaga prezento de svage supraĵa realo. Tiel svaga, ke ĝi ebligas al la eldonistoj skribi, ke en la rakontoj ĉefrolas "la observoj el la propra hejma realo, kiel simplaj agoj, objektoj, vortoj trovas novan dimension" kaj ke "en tiu nova dimensio Nemere malkovras profundajn latentajn". Demetante la maskon, la vernison de la prestigaj vortoj *krokizo, nova dimensio kaj profunda latentaj*, leganto mem malkovros nur la

## "Krokize..." aldonas nenion konsiderindan stile aŭ teme

grizan abismon de ĥamaleona neniodiro. Kontraste, kiam temas pri gravaj aferoj (bono kaj mavo, senco de l' vivo ktp) li estas tro klara, tro rekta kaj tro eksplicita (kio pensigas min pri senvola pastico de la mistikismo en *La profeto de Ĝibran' Ĥalil' Ĝibran'*).

Vera minimumismo, kiel ĉi-supre mi skribis, esprimas en minimuma longo enhavan kaj stilan maksimumon. Nenian rilaton mi vidas inter ĉi tiuj rakontoj de Nemere kaj beletra minimumismo. Tial estas groteske pretendi kompareblon, eĉ se nur alude, inter *Krokize...* kaj la *Unuminutaj noveloj* de István Örkény (la esperanta traduko de kelkdeko el ili aperos baldaŭ ĉe *Bero*). Nemere devas multon lerni de Örkény, kaj eĉ de si mem, ĉar la literatura nivelo de lia nova rakontaro subrestas tiun de *La naŭa kanalo*, lia unua libro esperanta.

Al ĝi *Krokize...* aldonas nenion konsiderindan stile aŭ teme. Se do okazis ne evoluo, sed stagno kaj preskaŭa malprogreso, kial eldoni ĝin? Kiel diras nia Proverbaro, mi ne povas kapti en ĝi la sencan.

Li havas bonajn ideojn, kiujn jen kaj jen li fuŝas pro mallerta kaj amatora rakonta tekniko. Ne gravas al mi, ĉu li vivtenas sin per verkado en la hungara, sed la rezulta impresio, kiun estigas en mi liaj esperantaj verkoj. Por verki bone ne sufiĉas nur havi bonan ideon. Ekzemplo estas la *fisa kaj musa* fino de la unua peco, *La domo*, kie li diras per vortoj tion, kion li ne kapablas sentigi preter- aŭ trans-vorte. Bedaŭrinde guste en t.n. mikronoveloj gravegas trafa fino (kio ne nepre signifas, ke ĝi estu surpriza, aŭ inversiga, aŭ ringe egala al la komenco). La samo okazas en la dua, tria kaj kvara rakontoj (respektive la unua parolvico sur p. 8, la sesa sur p. 10 kaj la deka sur p. 12, aŭ la tria alineo sur p. 13) kaj plu simile tra la tuta libro. Feliĉe, jen kaj jen, kiel en la fino de *La fatala amanto*.

Krome, sensanga ripeto de ideo nur igas ĝin des malpli forta kaj purkontura, kiel okazas en liaj rakontoj pri oldulo spertanta parton de natura ciklo, kies revenon li probable ne ĝisvivos.

Mi ricevis la impreson, ke li verkis historiojn iom maŝine kaj meĥanike pro (almenaŭ provizora) elĉerpigo de la

inspiron aŭ inspiron. Eble ankaŭ ĉar mankas la unueciga celo, la sameco aŭ celsameco karakterizaj en romano.

*Krokize...* taŭgas kiel legaĵo por progresantoj aŭ lernantoj de supera kurso (ĉefe la rakontoj *La surdmuto*, *La arbo* kaj *La turo*); tamen prefere oni legu liajn du plej bonajn romanojn: *La blinda birdo* kaj *Sur kampo granita*; kaj kiel antaŭromanen enkondukon mi rekomendas *La naŭa kanalo* (kiun, se elĉerpitan, oni devus reeldoni).

La lingvo de la libro estas bona, foje eĉ tre bona (malgraŭ kelkaj malgataĵoj, kiel la vorto *nekonatulo* sur p. 32), sed kiomgrade eblas paroli pri Nemere kiel pri originala verkisto? Estas konate, ke t.n. originalaj verkistoj kiel Corrado Tavanti, Deck Dorval kaj Julian Modest (laŭdire abunda je bulgarismoj) nur parte, foje tre etparte, kulpas aŭ responsas pri la stilo kaj lingvo de siaj verkoj. Kiu jam vidis tekston skribitan de Nemere mem sen eldonista trakribo, tiu scias, pri kio mi parolas. Ĝis nun la hungarajn eldonojn de liaj libroj reviziis lingve kaj stile Vilmos Benczik. Kaj ĉi tiun svisan? Probable Perla Ari Martinelli aŭ Giorgio Silfer.

Unu el la rakontoj de *Krokize...* aperis jam pli frue en *Sferoj 6*. Temas pri *La inferulo*, tipa specimeno de lia naiva kaj stulteta scienc- aŭ pacienfikcio, kiel plej aĉa reprezentanto estas la misromano *Terra*. Se kompari ambajn tekstojn, tiun eldonitan de *Literatura Foiro* kaj tiun aperigitan de *Grupo Niŝo*, rimarkeblas ĉ. 65 diferencoj (en resp. kvar aŭ ses paĝoj). Direblas, ke per tio la rakonto gajnis. Se tiel, almenaŭ estus bone scii, kiun ni danku kaj aplaŭdu pro la stila plibonigo.

Georgo Kamaĉo

- István NEMERE, *Krokize de mia ĝardeno*. Kooperativo de Literatura Foiro, 1992.

\* *ambajn* = akuzativa formo de *ambaj* aŭ *ambaŭ*. *La Fundamenta Gramatiko klare diras: la adjektivo finiĝas per a. Kazoj kaj nombroj kiel ĉe la substantivo.*



Ĉu diri la veron?

La ĉina verkisto Lusin foje rakontis, ke, kiam li estis lerneĵano, li iam diris al la instruisto, ke li ŝatus verki. Li petis lian helpon. "Kiel oni verkas?" li demandis. "Malfacile," la instruisto respondis, "jen mi rakontos al vi ion por klarigi."

\*\*\*

Iam (la instruisto rakontis) estis familio, en kiu infano naskiĝis. Vira infaneto. Ĉiuj familianoj, amikoj, samstratanoj venis por rigardi la etulon kaj gratuli la gepatrojn. Ĉiuj estis tre ĝojaj. Ĉiuj ankaŭ serĉis vortojn plej plaĉajn por kontentigi la gepatrojn.

"Rigardante lin," unu diris, "mi vidas, ke li estos feliĉa. Li riĉiĝos. Li havos multe da mono. Kaj dank' al tiu riĉeco, li povos havigi al siaj gepatroj plej feliĉan maljunecon. Jes, vi estas bonŝancaj: tiu estos vera riĉulo."

La gepatroj havis larĝan, brilan rideton, kiam ili dankis la parolinton pri tiuj belaj vortoj, kiuj ilin ĝojigis. Alia vizitanto proksimiĝas al la liteto.

"Ho jes, vi estas bonŝancaj," li diris. "Nur rigarcu tiun vizaĝon! Kia inteligenteco! Kia volforto! Tiu certe fariĝos iu grava en la ŝtata oficistaro. Li iros alten, alten. Estas klare pri li, ke li atingos tre altan lokon en la ŝtato, proksime al la ŝtatestro. Eble mi troigas pri ĉi-lastaj punktoj, sed pro tiu inteligenta vizaĝo oni povas antaŭvidi, sen povi erari, ke li atingos plej bonan situacion, kiu ajn la vojo, sur kiun la vivo lin irigos."

"Espereble, espereble," diris la patro. "Mi dankas vin pro tiuj belaj pensoj kaj vortoj."

"Mi nur diras la veron, kiun mi legas sur ĉi tiu vizaĝo," la viro respondis.

"Vi estas vera amiko," la patrino belvoĉis. "Viaj paroloj tuŝis rekte mian koron, mi sentas min tute dankoplena."

Ambaŭ gepatroj ridetis. Iliaj vizaĝoj elmontris plej profundan ĝojon.

Venis la vico de tria persono. Estis juna viro. Longe li rigardis la infaneton.

"Vi diras nenion, ĉu?" la patro diris.

"Ĉu vi aŭdis, kiel bele parolis pri li niaj amikoj, kiuj ĵus esprimis siajn pensojn?" demandis la patrino. Sed la juna viro plu rigardis senvorte.

"Nu, nu, ne estu timema," la patro diris. "Certe ankaŭ vi havas ideojn pri tio, kio okazos al ĉi tiu nia karuleto. Rigardu lin bone. Certe vi ekscios ion pri li."

Post refoje silenta momento, la viro rigardis al la gepatroj rekte en la okulojn.

"Jes. Mi estas tut-tute certa pri tio, kio koncernas lin. Pri tio mi scias, ke ĝi estas la plej senmanka vero."

La patro ridete parolis:

"Diru, do, diru, do. Se vi scias kun plena certeco, tio ege interesos min."

"Mi scias, ke li mortos," diris la juna viro.

Peza silento ekokupis la ĉambron. La homoj ne plu kapablis paroli, tiel ili miris, tiel nepermesebla ili trovis la sintenon de la junulo.

Kaj post tiu silenta minuto, ili ĉiuj ekparolis kune, forte, tre forte, kelkaj eĉ vere kriis.

"Ne eblas!", "Kia sinteno!", "Mi neniam imagus...", "Plej netaŭga

diro!", "Nekredeble!" oni aŭdis kun multaj aliaj krioj kaj paroloj, kiuj superis unu la alian, tiel ke nenio klare kompreniĝis.

La gepatroj rigardis la viron pli malame ol malĝoje, kvazaŭ li estus rompinta ilian mondon kaj pro tio indus morti. La plimulto el la vizitantoj simple ne povis elteni la situacion. Ili komencis frapi la junulon, kaj forkurigis lin, sekvante lin eksteren kun krioj plenaj je malamo.

\*\*\*

"Ĉu ne interese," la instruisto daŭrigis, "ke tiuj, kiuj diris malveraĵojn, ĝojigis la gepatrojn kaj la tutan ĉeestantaron, kvankam ĉiuj sciis, ke ili parolis pri aferoj, kiujn ili ne povas scii? Kaj la sola, kiu kuraĝis diri la solan aferon, kiu estis tute-tute certa, tiun oni frapis kaj kurigis for! Vi volas verki, vi diris. Ĉu vi volas priskribi la veron? Aŭ diri malveraĵojn, por ke oni danku kaj gratulu vin?"

"Mi volas diri nenion malveran," Lusin decide respondis.

"Sed," li aldonis post pripensa momento, "mi ankaŭ ne ŝatus, ke oni frapu min, kriu al mi, kaj min perforte elkurigu. Kion mi povus fari en simila situacio?"








"Se vi volas ne diri malveron, kaj tamen agi tiamaniere, ke certe oni ne frapos vin, restas al vi nur unu eblo: rigardu la infaneton, ridetu, kaj diru: "Ha tiu knabeto! Ho, kia infaneto! Ha-ha! Ho-ho!" □

• Claude PIRON. Vere aŭ fantazie. Fonto, Chapecó, Brazilo, 1989. 215 p.

# FREQÜÈNCIES

REVISTA DE LLENÇÜES I POBLES







## Festo de la lingvoj en Tuluzo



De la 20-a de marto ĝis la 3-a de aprilo okazos en Tolosa (Tuluzo) la *Prima de las lèngas (Printempo de la lingvoj)*. Tiu granda festivalo estas kunorganizata de 15 grupoj, i.a. *Institut d'Estudis Occitans Nauta-Garona, Collègi d'Occitania, Estèla d'Oc, Casal Català, Generalitat de Catalunya kaj Esperanto-Kultur-Centro.*

Jacme Gaudàs tiel klarigas la aranĝon:

"La *Prima de las lèngas* celas pluralecon. En lingvo enkorpiĝas la speciala naturo de popolo. Kiel skribis Antonin Perbosc: *Ĉiu popolo, kaj ĉiu frakcio de popolo, kiu parolas alian gepatran lingvon ol la reganta popolo, rajtas depostuli laŭ vidpunkto de la interesoj de la civilizo kaj de siaj homaj rajtoj.*

"Organizata de kuniĝo de asocioj, kune kun esperantistoj, la *Prima* celas esti festo de la lingvoj -la minoritataj kaj dialektiĝintaj lingvoj de Francio kaj de Eŭropo: okcitana, eŭska, kataluna, korsika, bretona, alzaca, nordfranca ktp., sed ankaŭ la lingvoj de aliloke, kiujn ni malbone konas sed kiuj paroliĝas tute apude: berbera, armena, asiria, esperanto...).

"Tuta okazaro: renkontiĝoj, ekspozicioj, laborgrupoj, konferencoj kaj debatoj okazos diversloke en Tuluzo kaj ĝia regiono, kaj la 3-an de aprilo okazos la ĉefa kuniĝo ĉe *Palatz dels Espòrts*. Kreinte la *Prima de las lèngas*, la *Institut d'Estudis Occitans* lo-

kas sin centren de kultura vojkruciĝo -Tuluzo havas taskon ankoraŭ lumigi la mondon."

Efektive, por tiu festivalo estas anoncitaj naŭ ekspozicioj, kvar debatoj kaj pluraj baloj kaj koncertoj.

La esperanta partopreno en ĝi estos tre vasta. Kune kun *Calendretas* (okcitanaj lernejoj), de la 20-a de marto ĝis la 2-a de aprilo EKC montras ekspozicion pri *Muziko de la lingvoj, arto kaj kaligrafio*, kaj kun *Estèla d'Oc* (okcitanistaj studentoj) samdate

ĝi ekspozicios pri *La vojo de la okcitana kreaĵo de post 20 jaroj kaj Esperanto en la mondo.*

Tiu mirinda fortostreĉo estas nur parto. La 30-an de marto ĉe la loka tuluzo televidstacio, EKC kunordigas televidan debaton pri *Kiun lingvistikan politikan por la regionoj kaj por Francio meze de Eŭropo - kiu(j)n lingvo(j)n ni parolos estonte?*, kiun i.a. partoprenos la famaj esperantistoj Claude Piron, Martin Haase kaj Jacme Taupiac, verkinto de la ĵusa *Diccionari de mila mots* (vidu la pasintan *Katalunan Esperantiston*) kaj la prezidanto de *Casal Català* en Tuluzo.

La sekvan tagon preskaŭ la samaj homoj partoprenos debaton en la Tuluzo universitato pri la temo *lingvistika komunikado celante mondan dimensio - la estonteco de la lingvoj.*

Fine, la ferman vesperon la muzikensemblo *La rozmariaj beboj* (kiu aperas sub sia esperanto-nomo en la nacilingvaj informiloj) koncertos en pli ol dudek lingvoj en la Sporta Palaco, antaŭante la finan spektaklon de Joan-Maria Carlotti kaj la Sardaj Polifonioj.

Ni tutkore gratulegas Esperanto-Kultur-Centro el Tolosa pro tiu grandioza taskaro. □

Tolosa

